

Heinrich Heine,

## En sonĝo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

En sonĝo princinon mi vidis  
 Kun vangoj malsekaj de ploro, -  
 Sub arbo, sub verda ni sidis,  
 Tenante nin koro ĉe koro.

“De l’ patro de l’ via la krono  
 Por mi ĝi ne estas havinda!  
 For, for la sceptro kaj trono -  
 Vin mem mi deziras, aminda!”

- “Ne eble!” Ŝi al mi rediras:  
 “En tombo mi estas tenata,  
 Mi nur en la nokto eliras  
 Al vi, mia sole amata!”

*Traduko de la Germana poemo “Mir träumte” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-526-1041 (2010-03-12 14:30:28)*

*La origina teksto verkita de Heinrich Heine troviĝas en la poem-volumo “Libro de l’ kantoj” (Buch der Lieder), parto “Lirika Intermezo” (Lyrisches Intermezzo). Anstataŭ la unua linio de la dua strofo de la traduko de L. Zamenhof mi, Manfred Retzlaff, proponas jenon: “De via patro la reĝa krono”.*